

IRANA ESPERANTISTO

IREA
Irana Esperanto-Aso

پیام سبزاندیشان

Kultura sezon-revuo en la persa kaj Esperanto
N-ro: 25, Dua Serio, Printempo 2018

فصلنامه‌ی فرهنگی دوزبانه‌ی فارسی و اسپرانتو
شماره ۲۵، دوره دوم، بهار ۱۳۹۷



La 5-a IREK: Lumigi Novajn Vojojn - La Progresigo de la Movado



Je la nomo de Dio

IRANA ESPERANTISTO

Pajam-e Sabzandiŝan
(Mesaĝo de Verdpensuloj)
ISSN 1728-6174

IRANA ESPERANTISTO
Kultura kaj sendependa sezon-revuo internacia
Dua serio, N-ro 25, Printempo 2018

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuaĵoj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj kontribuaĵoj ĉu en Esperanto ĉu en la persa.

***

به نام خداوند جان و خرد

پیام سبزاندیشان

فصل‌نامه‌ی پژوهشی - فرهنگی دوزبانه‌ی فارسی و اسپرانتو

دوره دوم، شماره بیست و پنجم، بهار ۱۳۹۷
شماره استاندارد بین‌المللی (ISSN):
۱۷۲۸-۶۱۷۴
تاریخ انتشار نخستین شماره: پاییز ۱۳۸۱

گرافیک وحروفچینی: سبزاندیشان

نشانی‌ها:
پایگاه اینترنتی: www.espero.ir
پست الکترونیک: info@espero.ir

همکاران تحریریه این شماره:


- حمزه شفیعی
- نازی صولت
- سیمین عمرانی
- امیر فکری
- منیره فهمی
- علی مرادی
- سروش محمدزاده
- شلر کریمی

Mallongigoj uzitaj en ĉi tiu numero

ILEK: Irana Literatura Esperanto Konkurso
IREA: Irana Esperanto-Asocio
IREJO: Irana Esperantista Junulara Organizo
IREK: Irana Esperanto-Kongreso
IRLEI: Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj
UK: Universala Kongreso

Kontribuantoj ĉi-numere

- Simin Emrani
- Monire Fahmi
- Amir Fekri
- Hamzeh Shafiee
- Nazi Solat
- Ali Moradi
- Surush Mohammadzadeh
- Shler Karimi



Kovrila Paĝo:
La 5-a Irana Esperanto Kongreso

Lasta Paĝo:
La plej Aktualaj Numeroj de Esperanto Revuoj

طرح روی جلد:
پنجمین کنگره اسپرانتوی ایران

طرح پشت جلد:
روی جلد آخرین شماره چند نشریه معتبر اسپرانتو



تصویر روی جلد آخرین شماره چند نشریه معتبر اسپرانتو

En ĉi tiu numero:

در این شماره:



Antaŭ ol ĉio…

Jen la printempa numero de "Iranaj Esperantistoj". Tiun ĉi numeron vi legas kelkaj semajnoj post la sukcesa okazigo de la Kvina Irana Esperanto-Kongreso. Feliĉe, la kongreso jam fariĝis regula ĉiu-jara programo en nia landa e-movado. Ĉi jara kongreso havis eksterlandajn gastojn kiuj multe kontribuis kaj helpis ke la kongreso esti konsiderata kiel sukcesa kaj fruktodona kongreso. Necesas kore saluti kaj danki ĉiujn partoprenantojn de la kongreso kaj ĝiajn organizantojn. Sendube la venontaj kongresoj estos pli maturaj kaj sukcesaj.

Ĵus post la kongreso, ni informis pri la ĉagraniga forpaso de nia samideano, Guy Perrin. Li partoprenis la unuajn du kongresojn de nia lando, kaj subtenis nian agadon pere de aktiva partopreno en niaj IREK-oj. Irana esperantistaro esprimas sian koran kondolecon al lia familio. Lia animo restu en paco.

Kaj laste estas la ĝojiga novaĵo pri la traduko de libro "Esperanto per Rekta Metodo". La libroj jam tradukis nia kara samideano S-ino Ŝler Karimi kaj estas preta por presiĝi. Ni esperas ke ĝi baldaŭ estu publikigota.

Via, Hamzeh Shafiee

قبل از هر چیز...

پنجمین کنگره اسپرانتوی ایران با موفقیت برگزار شد. پیام‌های رناتو کورستی و لی جونگ‌کی خطاب به شرکت‌کنندگان در این کنگره از اهمیت بسیار زیادی برخوردار هستند. در هر دو این پیام‌ها بر توانایی و جایگاه ویژه اسپرانتودانان ایرانی در منطقه تاکید شده است. این نکته‌ای است که جا دارد همگی ما نیز بر آن به طور ویژه توجه کنیم و فعالیت‌های خود را متناسب با این جایگاه ارتقاء بخشیم. افزایش دوره‌های آموزشی و تحرک بخشیدن به بدنه کنونی جامعه اسپرانتودانان ایرانی مهم‌ترین بخش از برنامه‌ای است که بایستی برای پیشبرد روزافزون اسپرانتو در کشورمان طرح‌ریزی نماییم. خوشبختانه با فعالیت‌هایی که اخیرا در دانشگاه‌های تهران و مشهد صورت گرفته و دوره‌های آموزشی در این دانشگاه‌ها برپا گردیده است، می‌توان به آینده روشن‌تر و فعال‌تر برای جنبش اسپرانتوی ایران امیدوار بود.

همزمان با پایان کنگره پنجم، خبر ناگوار درگذشت گی پرین، اسپرانتودان فرانسوی، موجب اندوه اسپرانتودانان کشورمان بویژه کسانی شد که در طی کنگره اول و دوم با این شخص به گفت‌وگو پرداخته و با وی آشنایی حاصل نموده بودند. درگذشت این شخصیت صمیمی و دوست‌داشتنی را به جامعه اسپرانتودانان ایران و جهان تسلیت می‌گوییم.

و نکته آخر نیز خبر مسرت‌بخش ترجمه کتاب "آموزش اسپرانتو به روش مستقیم" توسط سرکار خانم شلر کریمی است که گویا به سرانجام رسیده و آماده چاپ شده است. امیدواریم که این اثر هر چه زودتر چاپ و منتشر شود تا به تعداد منابع انگشت‌شمار آموزش اسپرانتو در کشورمان یک رقم افزوده گردد.

با سپاس از همراهی شما ، حمزه شفیعی

به مناسبت کنگره پنجم

پیرایه یأس از دل و جان کاسته شد
آوای امید و شوق برخاسته شد

حالا که رسیده پنجمین کنگره‌ات
"گل بود و به سبزه نیز آراسته شد!"

حسین علیزاده

La 5-a IREK:
Lumigi Novajn Vojojn
La Progresigo de la Movado

La Kvina Irana Esperanta Kongreso (IREK-5) okazis la 12-a ĝis la 14-a de Aprilo 2018 (= la 23a ĝis la 25-a de Farvardino 1397) en Tehrano, ĉefurbo de Irano. Partoprenis kaj renkontiĝis 42 gesamideanoj el diversaj urboj de Irano kaj de eksterlando. Programoj kaj prelegoj temis pri E-movado kaj la sciensaj aferoj. Inter la programeroj estis duon-taga kaj tut-taga ekskursoj.

Organizanto: Irana Esperanto-Asocio (IREA)

La 5a Irana Esperanto-Kongreso

Temo: *Lumigi Novajn Vojojn*



Mesaĝoj okaze de IREK-5



Salut-mesaĝo al la irana Esperanto-kongreso

Karaj iranaj esperantistoj, karaj gastoj,

mi konsideras privilegio la eblecon sendi salut-mesaĝon okaze de la inaŭguro de via kongreso.

En ĉi tiu momento en la historio kiel, cetere, en la tempo de Zamenhof, abomenindaj krimuloj laboras por estigi malpacon kaj militojn en la mondo. Ili estas tre pli potencaj ol esperantistoj, kies voĉo estas tre, vere tre malforta, sed estas nia devo ĉiam pli laŭte aserti, ke Esperanto estas ilo de paco, ke esperantistoj laboras por paca interkonatiĝo kaj kunlaboro inter ĉiuj popoloj, ke ne ekzistas popoloj, kiuj gvidas kaj rajtas je ĉio, kaj popoloj, kiuj sekvas kaj ne rajtas decidi pri sia propra estontaĵo.

En ĉi tiu kadro mi pensas, ke vi tre saĝe elektis la temon de via kongreso "Lumigi novajn vojojn". La mondo bezonas lumon kaj la mondo bezonas novajn vojojn. Bedaŭrinde ni vivas en situacio, kiu en monda skalo pli kaj pli similas al tiu, kiun Gegorges Orwell priskirbis en sia romano "1984", en kiu ne estas lumo sed intenca mallumo, en kiu la amaskomunikiloj ade ripetadas la veron de la potenculoj kaj inter tiuj veroj ne estas loko por iniciatoj kiel paco aŭ Esperanto.

Kaj tamen esperantistoj tra la tuta mondo per sia ekzisto kaj agado pruvas, ke agadoj por idealoj estas ekzistantaj kaj eventuale pli indaj ol aliaj agadoj kunligitaj kun akirado de potenco kaj de riĉaĵoj.

Estas fakto, ke la idealo de Esperanto trovis fekundan grundon en Irano jam de la komenco de la pasinta jarcento. Neniu rajtas forgesi ke Irano estis unu el la landoj, kiu proponis la diskutadon pri Esperanto en la Ligo de Nacioj en la komenco de la 1920-a jaroj. Kaj neniu rajtas forgesi ke la flamo de Esperanto neniam estingiĝis en Irano dum la tuta pasinta jarcento malgraŭ la malfacilaĵoj de tiu periodo. Kion tio povas signifi? Laŭ mi tio signifas, ke la irana kulturo estas grava fonto de hom-amaj valoroj, kiuj favoras la evoluon de movadoj kiel nia. Mi certe ne kapablas paroli al vi pri





la brilo de la irana kulturo, kiun vi tre bone konas. sed mi povas nur deziri, ke vi laboros por la celo konigi tiun kulturon en Esperanto multe pli ol ĝi estas nun konata. Dekoj da ĉefverkoj en la irana lingvo atendas traduko al Esperanto.

Per tio ni venas al pli interna temo. La irana Esperanto-movado estas unu el la fortaj movadoj en la Meza Oriento kaj en Centra Azio. Mi pensas, ke vi devus esti centro por disvastigo de Esperanto ankaŭ al viaj najbaraj landoj. Mi konas la problemojn kaj la barojn, kiuj prezentiĝas kontraŭ tio, sed mi kredas, ke vi kapablos venki ilin. Se vi sukcesos fari tion, vi helpos la internacian movadon kaj samtempe vi helpos internaciigi ankaŭ vian movadon mem.

Mi rimarkas, ke mi tro longe parolas kaj saltas de unu temo al la alia, sed tio ŝuldiĝas al la fakto, ke mi amas vian movadon kaj vidas en ĝi la eblon parte forigi la eŭropecon de Esperanto, kiu jam ne plu estas akceptebla por internacia lingvo de la tuta mondo.

Multan sukceson al via kongreso!

Renato Corsetti

Eksa prezidanto de Universala Esperato-Asocio



De Irano al la mondo!

Estimataj kongresanoj,

Okaze de la 5-a Irana Kongreso de Esperanto, mi sendas varman aplaŭdon pro ĝia senpaŭza okazigo post la unua kongreso, en kiu mi mem honore partoprenis.

En la 1-a kongreso mi okule rimarkis, ke irana movado estas tre potenciala kaj abundas je kompetentaj esperantistoj. Ĝuste nun estas tempo ke iranaj esperantistoj brile kontribuos por Esperanto-movado internacie. Ankoraŭ Esperantujo postulas multe da kompetantaj esperantistoj, kiuj gvidos, kursos, organizos kaj diskonigos nian lingvon kaj movadon al la mondo.

Mi esperas ke tra la 5-a kongreso de iranaj esperantistoj pli da samideanoj gajnos novajn motivojn por engaĝiĝi ne nur en la landa movado sed ankaŭ en la monda.

Esperante enhavriĉan kongreson, mi kore gratulas.

15-an de marto, 2018

LEE Jungkee (estrarano de UEA pri Azia Movado)



Program-listo de IREK5

Tehrano (12-14 Aprilo/2018)

12/ 4/ 2018

10:00	**Registrado kaj disdono de kartoj + ….(Regalaĵoj)+ muziko**
11:00	**Himno de Irano**
11:10	**Himno de Espero**
11:15- 11: 30	**Salutoj de urbaj agentoj**
11:30- 11: 45	**Mesaĝoj de … (Renato, Lee,..)**
11: 45– 11:55	**IREA raportas**
12:00– 12:10	**Ali Moradi (IREJO raportas)**
12:10– 12:45	**S-ro Sayadpur (Adrenalino dum miaj vojaĝoj)**
12:45 – 13:00	**S-ino Ŝler Karimi (Poemoj de Ŝirku Bikas)**
13:10	**Ek al Si-e tir- strato (ekskurso)**

13/4/ 2018

10:00- 10:20	**S-ro Benjamin (la vojaĝo kaj mia aktiveco en Irano)**
10:20 – 10:40	**S-ro Fekri (INTERES-ET-AĴOJ)**
10:40 - 11:00	**S-ro Sedaghat (Translokigi akvon de Khazar- lago ĝis centra dezerto de Irano, Semnano)**
11:00 – 11: 15	**Kafo kaj regalaĵoj(muziko)**
11:15 – 11: 45	**S-ro Sayadpur (Internacia Gastronomio)**
11:45 - 12:15	**S-ino Annie ("Afriko, Mezoriento kaj mi")**
12:15 - 12: 45	**S-ro Kosari (Samepokaj esperantistoj Iranaj, iliaj verkoj)**
12: 45 - 13:15	**gesinjoroj Karimi kaj Fekri (Rakontado)**
13:15 - 15:00	**Tagmanĝo**
15:00 – 15:30	**S-ino Solat(Paroliga sesio)**
15:30 – 16:00	**S-ino Emrani (reptiulimi)**
16:00 – 16:15	**S-ro Sayadpur(Aŭkcio)**
16:15 – 16: 30	**S-ro Mamduhi (Kio okazis/os en kvartalo 22 de Tehrano)**
16:30– 16:45	**S-ino Solat (prezenti esperanto.net kaj ĝiaj eblecoj)**
16:45 – 17:00	**Disdoni donacojn kaj malfermo de IREK5**

14/4/2018

6:00	**Ek al Masule**

Sazman-Barname Shomali Kvartal-Domo,
Tehrano, Irano
La 13an de Aprilo 2018
(La 24an de Farvardino 1397)

Reptiliumi

Prezento de Simin Emrani en la 5a Irana Esperanto-Kongreso (IREK-5)




Reptiliumi estas Esperanta idiotismo kun la signifo "krokodili, aligatori aŭ kajmani". Ĝi tamen estas ege malofte uzata, ĉar kutime oni simple uzas krokodili anstataŭe.



1 Aligatori

Aligatori estas Esperanta idiotismo kun la signifo "en Esperanta medio paroli alian lingvon ol Esperanton, kiu estas gepatra lingvo de nur parto de la ĉeestantaro". Tamen, la preciza difino de aligatori povas iomete varii.
En la plej multaj situacioj, aligatorado estas same malakceptata inter esperantistoj kiel krokodilado.



Tamen, dum kelkaj internaciaj Esperanto-renkontiĝoj, oni organizas apartan programeron nomitan aligatorejo, dum kiu oni nur rajtas aligatori kaj kajmani, por ke oni praktiku sian scipovon de fremdlingvoj. Aŭ ekster tiaj aligatorejoj, aligatorado por plibonigi sian scipovon de fremdlingvo estas pli akceptata trajto ol krokodilado.
Homon, kiu aligatoras, oni kelkfoje nomas aligatoro.

2 Gaviali

Gaviali estas Esperanta idiotismo kun la signifo "paroli Esperanton, kiam alia lingvo pli taŭgus" aŭ kun la signifo "uzi Esperanton por ke ĉeestantaj ne-Esperantistoj ne komprenu nin".
Inter esperantistoj, gaviali (en la unua signifo) estas

kutime pli akceptata ol krokodili, ĉar per ĝi oni praktikas sian scipovon de Esperanto, por ke oni poste povu uzi ĝin, kiam oni vere bezonas ĝin, parolante kun eksterlandanoj.



Gaviali en la dua signifo ofte okazas, kiam malmultaj Esperantistoj renkontiĝas ekster Esperanto-aranĝo, kaj estas kune kun ne-Esperantistoj. Se ili volas komuniki ion sen esti komprenataj de la ne-Esperantistoj, ili povas uzi Esperanton.
Tion oni nomas "gaviali" (en la dua signifo de la vorto). Tiun agon ne-Esperantistoj povas konsideri ĝena.
Homon, kiu gavialas, oni kelkfoje nomas gavialo.

3 Kajmani

Kajmani estas esperanta idiotismo kun la signifo "en Esperanta medio paroli lingvon alian ol Esperanton, kiu estas gepatra lingvo de neniu ĉeestanto". Tamen, la preciza difino de kajmani povas iomete varii.



En la plej multaj situacioj, kajmanado estas same malakceptata inter esperantistoj kiel krokodilado. Tamen, dum kelkaj internaciaj Esperanto-renkontiĝoj, oni organizas apartan programeron nomitan aligatorejo, dum kiu oni nur rajtas aligatori kaj kajmani, por ke oni praktiku sian scipovon de fremdlingvoj.
Homon, kiu kajmanas, oni kelkfoje nomas kajmano.

4 Krokodili

Krokodili estas Esperanta idiotismo kun la signifo "en Esperanta medio paroli lingvon, kiu estas la denaska lingvo de iuj ĉeestantoj". Kelkfoje la vorto krokodili estas uzata kun la signifo "en Esperanta medio paroli ajnan etnan lingvon".



Krokodilado estas ĝenerale malakceptata inter esperantistoj. Oni volas eviti ĝin por pli bone praktiki Esperanton, por ke oni povu bone uzi ĝin, kiam oni vere bezonas ĝin, parolante kun eksterlandanoj. Homoj, kiuj nur malofte povas vojaĝi eksterlanden, alikaze preskaŭ neniam havus la eblecon praktiki sian Esperanton. Dum internaciaj Esperanto-renkontiĝoj, krokodilado povas kaŭzi nekomprenon, kaj tial estas eĉ malpli akceptata ol en kunvenoj de samlandanoj. Aldone, krokodilado povas kaŭzi malbonan impreson al vizitantaj ĵurnalistoj aŭ aliaj eksteruloj ĉe la aranĝoj, ĉar ili povus pensi, ke per Esperanto oni ne povas bone esprimi sin. Ĉiuj ĉi kialoj kune igas la krokodiladon malakceptata inter esperantistoj, tiel ke ili ofte instigas homojn paroli Esperanton, eĉ se tio ne absolute necesas por rektaj komunikaj kialoj. Tamen, foja krokodilado kun komencantoj por klarigi gramatikajn detalojn estas pli akceptata. Sed multaj preferas alparoli komencantojn per simpla, malrapida Esperanto, por ke ili baldaŭ plibonigu sian lingvoscion. Paroli en fremdlingvo por plibonigi sian scion de alia fremdlingvo en Esperanto-aranĝo estas iom pli akceptata trajto.

5 Lacerti


Lacerti estas Esperanta idiotismo kun la signifo "en Esperanta medio paroli alian planlingvon ol Esperanton".
Tamen, la preciza difino de lacerti povas iomete varii. Pli malofta signifo estas "en Esperanta medio, inter parolantoj kun similaj denaskaj lingvoj, uzi sian gepatran lingvon".
Ekzemple kiam hispana esperantisto parolas la hispanan al brazila esperantisto, kaj nur estas komprenata pro la simileco inter la hispana kaj la portugala.



Lacerti (en la pli kutima, unua, signifo) estas multe malpli kutima fenomeno ol la aliaj reptiliumadoj. Pro tio ne ekzistas tiom fortaj sintenoj kontraŭ ĝi kiel kontraŭ la aliaj reptiliumadoj. Multaj esperantistoj tamen ĝenerale malaprobas aliajn projektojn por internacia helplingvo, kaj tial ankaŭ koleriĝus aŭdi ilin en Esperanta aranĝo. Tamen la planlingvo Tokipono, kiu ne celas esti internacia helplingvo, estas instruata en apartaj kursoj dum la tri lastaj IS-oj (inter jaroj 2003 kaj 2006) kaj multaj homoj interesiĝis pri ĝi. La fakto, ke ĝi ne estas konkurenco al Esperanto, faciligas ĝian vojon al “akceptata lacertado”.
Homon, kiu lacertas, oni kelkfoje nomas lacerto.

La fenomeno de fanatikaj kontraŭ-krokdilistoj

Ekzistas en la Esperanto-movado ankaŭ la fenomeno de fanatikaj kontraŭ-krokodilistoj. Temas pri personoj, kiuj fervore kaj fanatike atakas ĉiun - kaj precipe eĉ komencantojn -, kiuj dum Esperanto-renkontiĝo elbuŝigas ne-esperant-lingvan vorton per la akretona frazeto: "Ne krokodilu!". Tiu ĉi fenomeno ne malofte komplete senkuraĝigas komencantojn, kiuj poste neniam plu reaperas en Esperanto-renkontiĝo. La bona intenco, ke oni instigu la homojn praktiki sian Esperanton kaj pli-bonigi siajn lingvo-konojn, per tia konduto tiam turniĝas al forbarilo por novaj lernantoj kun la tute kontraŭa efiko.


Fontoj de teksto kaj bildoj, kontribuintoj kaj permesiloj:

- **Reptiliumi** *Fonto:* https://eo.wikipedia.org/wiki/Reptiliumi?oldid=5818777 *Kontribuintoj:* Amikeco, Marcos, Tlustulimu, Airon90, NMaia,
KuBOT, Salatonbv, Lingveno kaj Anonimaj: 1
- **Dosiero:Alligator.jpg** *Fonto:* https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/9/98/Alligator.jpg *Permesilo:* Public domain *Kontribuintoj:*
? *Origina artisto:* ?
- **Dosiero:Gavialis_gangeticus.jpg** *Fonto:* https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/1/1d/Gavialis_gangeticus.jpg *Permesilo:*
CC BY 2.0 *Kontribuintoj:* originally posted to Flickr as Gharial (Gavialis gangeticus) *Origina artisto:* Cliff
- **Dosiero:Lacerta_agilis_1_(Marek_Szczepanek).jpg** *Fonto:* https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/3/39/Lacerta_agilis_1_
%28Marek_Szczepanek%29.jpg *Permesilo:* CC-BY-SA-3.0 *Kontribuintoj:* ? *Origina artisto:* ?
- **Dosiero:Loupe.svg** *Fonto:* https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/4/48/Loupe.svg *Permesilo:* Public domain *Kontribuintoj:*
modified version of *Origina artisto:* Lipedia
- **Dosiero:NileCrocodile.jpg** *Fonto:* https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/8/81/NileCrocodile.jpg *Permesilo:* CC BY-SA 2.0
Kontribuintoj: ? *Origina artisto:* ?
- **Dosiero:Spectacled_Caiman.JPG** *Fonto:* https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/a/a0/Spectacled_Caiman.JPG *Permesilo:*
CC BY-SA 2.5 *Kontribuintoj:* ? *Origina artisto:* ?
- **Dosiero:Unue.svg** *Fonto:* https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/1/1d/Unue.svg *Permesilo:* CC0 *Kontribuintoj:* Tiu dosiero
estis derivita de: First.gif
Origina artisto: darkweasel94, user:Vesperholly
- **Permesilo de enhavo**
Creative Commons Attribution-Share Alike 3.0


Rimarko: Esperanta Vikipedio

نوآم چامسکی:
"اسپرانتو زبان گویشوران مادرزاد است"

متاسفانه زبان‌شناسان اغلب درباره اسپرانتو منفی صحبت می‌کنند. برای درک بهتر پیش زمینه این مسئله من به‌دقت به ادعاهای زبان‌شناسان مختلف، آن‌هایی که در مصاحبه‌ها و اشاره‌های جانبی چندخطی مقاله‌های اسپرانتو آمده است، نگاهی انداختم. تقریبا در همه موارد به این نتیجه رسیدم که، مشکل کم‌تر پیشداوری آن‌ها، بلکه اغلب کمبود آگاهی درباره حقیقت فعلی اسپرانتو می‌باشد.

اشتباهات زبان‌شناسان درباره سرزمین اسپرانتو

یکی ادعا کرد که، اسپرانتو "نه نویسنده دارد نه اثر". زبان‌شناس دیگری به‌صورت مشابه گفت که، اسپرانتو "اصلا" ادبیات ندارد. زبان‌شناس دیگری بر این عقیده بود که، اسپرانتو برای کسانی که خارج اروپا هستند به اندازه فرانسوی‌ها، اسپانیایی‌ها یا ایتالیایی‌ها به‌سختی قابل دسترس است. به گفته یک واژه‌شناس اسپرانتو گویشوران بومی ندارد. زبان‌شناس دانشگاه باور بسیار رایجی را گفت که کسی نمی‌تواند اسپرانتو صحبت کند (درست پس از این‌که مکالمه تلفنی را به اسپرانتو شنید...). از بسیاری از متون و مصاحبه‌های دیگر می‌شود به‌خوبی فهمید که نویسنده‌ها تصور می‌کنند که، این‌قدر از اسپرانتو کم استفاده می‌شود که، توانایی تولید بیان خوب و منسجم در زبان ما کافی نیست. اولش کمی آزرده خاطر شدم، اما گاهی اوقات طرف جالب قضیه را بیشتر می‌بینم – بسیار تاثیرگذار است، که این چنین افراد باهوشی درباره حقایقی چنین واضح، که به‌آسانی قابل یافت هستند، اشتباه



می‌کنند. من هم دیگر آن‌ها را به‌دلیل عدم تحقیق سرزنش نمی‌کنم – من فهمیدم که، آنها این را از زبان‌شناسان مسن‌تر "آموخته‌اند" و این‌که آن‌ها نیازی به جست‌وجوی پیش‌زمینه نمی‌بینند، همان‌طور که همه ما نیازی به اثبات این نداریم که بگوییم در اواسط تابستان هوا گرم‌تر از زمستان است. شاید انسان‌ها حق پایه اشتباه‌کردن – اما به‌علاوه در صورت توان تصحیح آن را دارند. (من توجه شما را به این جلب می‌کنم که، آن زبان‌شناسان، که تصمیم گرفتند کمی زمان را به جست‌وجو درباره ادبیات کنند، اغلب بدون شک اسپرانتو را کاملا حقیقی معرفی می‌کنند.)

آیا اکثریت درباره حقایق گمراه‌اند؟

می‌توانستم نام این افراد را ذکر کنم، اما کمکی نخواهد کرد و همچنین خوب نیست تنها این آدم‌ها را برجسته کنیم. موضوع درباره تصورات غلط نه فقط یک نفر، بلکه به نظر درباره اشتباه رایج بین اکثر زبان‌شناسان می‌باشد. من درباره تحقیق این موضوع بین زبان‌شناسان نمی‌دانم (پس دقیقا درباره دانش سرزمین اسپرانتو و نه درباره قضاوت درباره آن). اما این برداشت را دارم که، سوال‌هایی که خبرنگاران از زبان‌شناسان می‌پرسند و مقاله‌هایی که در آن‌ها زبان‌شناسان چندخطی درباره اسپرانتو نوشته‌اند، به‌صورت خلاصه نزدیک به تجربه آماری است؛ به نظر می‌رسد موضوع درباره انتخاب نسبتا تصادفی سوال‌شوندگان و نویسندگان باشد. من با دقت ادعاهای لفظی و مکتوب هشت زبان‌شناس،



Noam Chomsky:
„Esperanto estas lingvo por denaskuloj“

Lu Wunsch-Rolshoven

Bedaŭrinde lingvistoj ofte esprimas sin negative pri Esperanto. Por bone kompreni la fonon mi detale rigardis interalie dekon da asertoj de diversaj lingvistoj, kiuj aperis en intervjuoj kaj en kelkliniaj flankaj mencioj de Esperanto en artikoloj. En pli-malpli ĉiu okazo mi konstatis, ke la problemo estas multe malpli ilia prijuĝo, sed tre ofte simple ilia misinformiteco pri la nuna realeco de Esperantujo.

Eraroj de lingvistoj pri Esperantujo

Iu asertis, ke Esperanto havas „nek aŭtorojn nek verkojn". Alia lingvisto diris simile, ke literaturo ĉe Esperanto „komplete" mankas. Plia lingvisto kredis, ke Esperanto estas por ekstereŭropanoj same malfacile alirebla kiel la franca, hispana aŭ itala. Laŭ iu filologo Esperanto ne havas denaskulojn. Universitata lingvisto esprimis la evidente tre profundan kredon, ke Esperanton oni ne povas paroli (tuj post kiam li aŭdis telefonan interparoladon en Esperanto...). El pluraj aliaj tekstoj kaj intervjuoj oni bone komprenas la supozon de la aŭtoroj, ke oni uzas Esperanton tiom malmulte, ke tio ne sufiĉas por krei bonan kaj koheran esprimeblon en nia lingvo.

Komence mi iom ĉagreniĝis, sed intertempe mi pli kaj pli vidas la amuzan flankon de la afero – ja estas imprese, ke tiel kleraj homoj tiom evidente eraras pri faktoj, kiuj estas tre facile eltroveblaj. Mi ankaŭ ne plu akuzas ilin pro manko de zorga esploro – mi komprenis, ke ili „lernis" tion de pli aĝaj lingvistoj kaj ke ili ne vidas neceson serĉi fontojn, same kiel neniu el ni vidus neceson trovi fonton por la aserto, ke somere mezume pli varmas ol vintre. Eble homoj havas la bazan homan rajton fari eraron – sed aldone la devon korekti ĝin laŭeble. (Mi atentigas, ke tiuj lingvistoj, kiuj dediĉis iomete da tempo al la literatura serĉado, kompreneble kutime prezentas Esperanton tute realece.)

Ĉu plimulto estas misinformita pri la faktoj?

Eblus citi la nomojn de la koncernuloj, sed tio ne helpos kaj ankaŭ ne estos tre juste elstarigi ĝuste tiujn homojn. Temas pri eraraj supozoj ne de unuopuloj, sed ŝajne pri ĝenerala erara kredo inter granda plimulto de la lingvistoj. Mi ne scias pri ĉi-tema enketo inter lingvistoj (do ĝuste pri la detala *scio* pri Esperantujo kaj ne pri la juĝo). Tamen mi havas la impreson, ke la demandoj, kiujn ĵurnalistoj metis al lingvistoj, kaj la artikoloj, en kiuj lingvistoj skribis kelkajn liniojn pri Esperanto, sume estas tre proksimaj al statistika eksperimento; temas ŝajne pri relative hazarda elekto de demanditoj kaj verkantoj. Mi zorge kolektis la buŝajn kaj skribajn asertojn de ok lingvistoj, el kiuj kvar montris gravajn erarojn pri Esperanto kaj ĝia uzado en intervjuo kaj la aliaj kvar montris tiajn erarojn en artikolo. Ni povas el tio kalkuli la supozeblan procentaĵon de eraruloj inter ĉiuj lingvistoj: Kun 95-procenta probablo inter 75% kaj 100% de la lingvistoj kredas je gravaj eraroj pri Esperanto kaj Esperantujo kiel la supre menciitaj. Kompreneble estus tre bele konfirmi tion per detalaj telefonaj enketoj pri la fakta scio pri Esperantujo, ekzemple ĉe universitataj asistantoj, en diversaj landoj. (Ĉu iu el la legantoj entuziasmiĝas?)

Pri kiu „Esperanto" Chomsky parolis?

Mia kolektado kaj esplorado gvidis min ankaŭ al asertoj de Noam Chomsky, eble la plej konata lingvisto de la 20-a jarcento kaj intertempe ankaŭ fama pro sia politika engaĝiĝo. Li plurfoje faris eldirojn pri Esperanto, kiujn mi ne sukcesis klarigi el la fakta stato de Esperantujo kaj el aparta studo de liaj teorioj kaj de lia uzo de la vorto „lingvo". Ja estas notinde, ke Chomsky konsideras vera lingvo nur tion, kion denaskulaj infanoj uzas antaŭ proksimume la sesa vivojaro; poste ili eniras lernejon kaj tiam sekve ilia lingvo-uzo estas iom ŝanĝita konforme kun la reguloj de la norma lingvo de la lando.

Kial en kelkaj intervjuoj li dubis pri tio, ke Esperanto estas lingvo? Ĉu li estis bone informita pri la fakta multloka uzado de Esperanto kaj pri tio, ke Esperanto estas parolata de almenaŭ milo da denaskuloj, kiuj ankaŭ kun gefratoj kaj en internaciaj kunvenoj kun pliaj samaĝuloj uzas nian lingvon?

Dum iom da tempo mi ankoraŭ diskutadis la problemon en diversaj forumoj kaj fine mi decidis demandi al Mark Aronoff, kiu iam intervjuis Chomsky, esence: pri kiu „Esperanto" supozeble parolis Chomsky – ĉu pri la projekto de 1887, pri la unua aplikado, pri la nuntempe tutmonde uzata lingvo, pri la lingvo de denaskuloj? Aronoff helpis min plukompreni la pensojn de Chomsky kaj kuraĝigis min demandi la famulon mem.

La respondo de Chomsky

En la 24-a de novembro mi do retmesaĝis al Noam Chomsky, detalante la temon pri la diversaj eblaj komprenoj de la vorto „Esperanto" kaj demandante kerne, ĉu la Esperanton de antaŭlernejaj denaskuloj li nomus „lingvo". Duonhoron poste venis la respondo: „Esperanto is a language for native speakers, but it is not what is described by the 'grammars of Esperanto'." (Esperanto estas lingvo por denaskuloj, sed ĝi ne estas tio kion priskribas la 'gramatikoj de Esperanto'.) Li atentigis, ke la Esperanto-gramatikoj similas al tradiciaj gramatikoj de aliaj lingvoj, ke ili donas kelkajn regulojn, sed ke ili esence baziĝas sur la homa lingvo-kapablo.

Jen ni do feliĉe disponas pri eldiro de fama lingvisto, kiu konsideras almenaŭ la lingvon de Esperanto-denaskuloj vera lingvo. Eĉ se li mem ne nomas la komunikilon de pliaĝuloj vera „lingvo" (same kiel ĉe ĉiuj aliaj normigitaj lingvoj), certe la eldiro de Chomsky helpos al ni iom skui la miskredojn de lingvistoj kaj aliaj pri Esperanto.

Esperanto 1322(3) Marto 2018 59

که از بین آن‌ها چهار نفر اشتباهات مهمی درباره اسپرانتو و استفاده آن در مصاحبه نشان دادند و چهار نفر دیگر چنین اشتباهاتی را در مقالات کردند، را جمع‌آوری کردم. ما می‌توانیم از آن درصد تقریبی کسانی که بین تمام زبان‌شناسان اشتباه می‌کنند را محاسبه کنیم: با احتمال ۹۵ درصد بین ۷۵٪ و ۱۰۰٪ از زبان‌شناسان عقیده بر اشتباه‌های مهم درباره اسپرانتو و سرزمین اسپرانتو مانند آن‌هایی که در بالا ذکر شد، دارند. بدون شک خیلی خوب می‌شد که آن را توسط جزئیات تلفنی پرس‌وجو کرده و درباره دانش حقیقی سرزمین اسپرانتو، برای مثال از معاونت دانشگاه‌ها در کشورهای مختلف، تثبیت می‌کردیم. (آیا کسی از خوانندگان به این کار علاقه‌ای دارد؟)

چامسکی درباره کدام "اسپرانتو" صحبت می‌کرد؟

جمع آوری اسناد و تحقیقات من را به سمت ادعاهای نوآم چامسکی، شاید معروف‌ترین زبان‌شناس قرن بیستم و همچنین فردی به‌نام به‌دلیل درگیری‌های سیاسی‌اش، هدایت کرد. جالب توجه است که، چامسکی تنها زبانی را طبیعی می‌داند که، بچه‌های گویشور مادرزاد از آن پیش از تقریبا شش سالگی استفاده کنند؛ پس از آن آن‌ها به مدرسه می‌روند و سپس استفاده زبان آن‌ها با تناسب به قوانین رسمی زبان کشور تغییر می‌کند.

چرا در برخی مصاحبه‌ها او به این‌که اسپرانتو زبان است شک داشت؟ آیا او به‌خوبی درباره این حقیقت که از اسپرانتو در بسیاری از کشورها استفاده می‌شود، و اسپرانتو توسط دست کم هزار گویشور مادرزاد و هم‌چنین در جوامع جهانی با دیگر هم‌سالان صحبت می‌شود، آگاهی داشت؟

برای مدتی من هم‌چنان در حال بحث درباره این مشکل در انجمن‌های مختلف بودم و در نهایت تصمیم گرفتم که از مارک آرونوف که زمانی با چامسکی مصاحبه کرده بود بپرسم که: چامسکی دقیقا درباره کدام "اسپرانتو" صحبت می‌کرد — آیا درباره پروژه سال ۱۸۸۷، در مورد اولین کاربرد آن، درباره زبان فعلی که در جهان استفاده می‌شود، راجع به زبان گویشوران مادرزاد؟ آرونوف به من کمک کرد تا تفکرات چامسکی را بهتر درک کنم و مرا به پرسش از خود او نیز ترغیب کرد.

پاسخ چامسکی

بدین صورت من در ۲۴ نوامبر به نوآم چامسکی ایمیل زدم، و درباره موضوع برداشت‌های مختلف از کلمه "اسپرانتو" و به‌خصوص درباره این‌که، آیا او اسپرانتوِ گویشوران مادرزاد پیش دبستانی را "زبان" می‌نامد یا خیر، پرسیدم. نیم ساعت بعد، پاسخ آمد: "اسپرانتو زبانی برای گویشوران مادرزاد است، اما چیزی نیست که توسط دستورزبان اسپرانتو چنین توصیف شده باشد." او توجه مرا را به این جلب کرد که، دستورزبان اسپرانتو شبیه دستورزبان سنتی زبان‌های دیگر است، که قوانینی را دارند، اما آن‌ها به‌طور اساسی بر پایه توانش زبانی انسان می‌باشند.

پس ما خوشبختانه طبق بیان زبان‌شناس معروف، که حداقل زبان گویشوران مادرزاد اسپرانتو را زبانی حقیقی می‌داند، تصمیم می‌گیریم. اگر حتی خود او از ابزار مکالمه بزرگ‌سالان به‌عنوان "زبان" حقیقی یاد نکند (مانند دیگر زبان‌شناسان نام برده شده)، بدون شک بیان چامسکی به ما کمک می‌کند کمی از اعتقادات نادرست زبان‌شناسان و دیگران درباره اسپرانتو منحرف شویم.

Lu Wunsch-Rolshoven، مجله اسپرانتو مارس ۲۰۱۸
مترجم: علی مرادی



Guy Perrin nia internacia esperantisto ne plu estas.

Nia amiko Guy PERRIN forpasis la 9-an de Aŭgusto 2017.



Ni tre sincere kondolencas lian familion.

گی پرین، اسپرانتودان فرانسوی که در اولین و دومین کنگره اسپرانتوی ایران نیز شرکت کرده بود، به علت سقوط در آب و غرق‌شدن هنگام قایق‌سواری از دنیا رفت. یادش گرامی باد.

چند سوال از استانو مارچک

مجله اسپرانتو: کتاب اسپرانتو به روش مستقیم شما "سالگردش را جشن می‌گیرد.

اس.ام: بله – این کتاب به ۴۰ زبان منتشر شد: انگلیسی، فرانسوی، ایتالیایی، روسی، چینی، ژاپنی، کره ای، پرتغالی، لهستانی، اسلواکی، تایلندی، اسپرانتو، یونانی، هلندی، ایرلندی، رومانیایی، آلمانی، دانمارکی، لیتوانی، صربی، ویتنامی، نروژی، لوکسانبورگی، مجارستانی، فنلاندی، چکی، اسپانیایی، اکراینی، سوئدی، ارمنی، ایسلندی، اندونزیایی، ترکی، هندی، بولغاری، لاتین، عربی و لتونیایی.

مجله اسپرانتو: چرا تصمیم به نوشتن این کتاب گرفتید؟

اس.ام: در آن زمان من در خانه فرهنگ شهر خودم دوره‌های اسپرانتو برگزار می‌کردم. هیچ‌کدام از کتاب‌های آموزشی اسپرانتو در چکسلواکی آن زمان، برای من مناسب نبودند. برای همین تصمیم به نوشتن کتاب خودم گرفتم. من مطالعه روانشناسی تدریس زبان‌های خارجی و روش‌شناسی تدریس اسپرانتو را شروع کردم. این گمان من را تائید کرد که بهترین روش برای تدریس زبان خارجی روشی به نام "روش مستقیم" می‌باشد، یعنی همان روشی که والدین ما زبان مادری‌مان را به ما آموختند ☺. تدریس و تفکر در خود زبان، و نه ترجمه!

مجله اسپرانتو: لطفا بیشتر درباره این روش صحبت کنید.

اس.ام: کتاب آموزشی پرعکس من (عکس‌ها را دخترم لیندا طراحی کرده است) بر پایه روش مستقیم و القایی بنا شده است: نتیجه‌گیری قوانین عمومی از حقایق محکم، که طبق آن‌ها دانش‌آموزان – با کمک عکس‌ها و مقایسه – به‌صورت ناخودآگاه توضیحات عناصر جدید را فرامی‌گیرند و پس از آن – در متن‌ها و تمرین‌ها – مجدد آن‌ها را دیده و تا فراگیری کامل تمرین می‌کنند. پس از درس به‌روش مستقیم (در نسخه‌های ترجمه شده) به قسمت گرامر می‌رسیم که در آن توضیحات به زبان ملی موادی که به صورت مستقیم فراگرفته شده بودند را شفاف‌سازی می‌کند.

ذخیره کلمات کتاب آموزشی با استناد به لیست کلمات مکرر رسمی (مجموعه ریشه‌های پایه رسمی، فرمان‌های آکادمی ۲)، که آکادمی اسپرانتو آن را برای همه کتاب‌های آموزشی اسپرانتو پیشنهاد می‌کند، می‌باشد. کتاب از ۷۵۰ تا پرکاربردترین واژک‌ها استفاده می‌کند – در آغاز کلمات بیشتر استفاده شده و غیره – و تضمین می‌کند که، فراگیر اول واژه‌هایی که بیشتر از آن‌ها استفاده می‌شود را فرابگیرد تا بتواند در موقعیت‌های روزمره صحبت کند.

مجله اسپرانتو: چطور و چگونه آنقدر کتاب به زبان‌های مختلف ترجمه شد؟

اس.ام: کتاب اول به زبان اسلواکی، و پس از آن نسخه جهانی، بدون توضیحات زبان‌های ملی (متد مستقیم خالص) پدیدار شد. دوست لهستانی من استاشک ماندراک پیشنهاد داد تا نسخه اسلواکی را به زبان لهستانی ترجمه کنیم. من همه متون زبان ملی را به اسپرانتو ترجمه کردم، و او آن‌ها را به لهستانی ترجمه کرد. این مسئله معلمان دیگر



کشورها را به ترجمه کتاب به زبان‌های خودشان ترغیب کرد. در زیر نام برخی از آنها را مشاهده می کنید: راب موربیک به همراه تیم‌اش، روی مک کوی، ایونل اونِت، امرهِ سزابو، لویگیا اوبراخ، برونیسلاو چوپین، لیو هایتو، آویاما تورو، لِی جونگ کی، گورگو درماتیس، شاون او ریان، آرنه کاسپر-مورتنسن، کارین آراکلیان، ترزا کاپیستا، اندری و دالیا پیلکین، کارل-گوستاف گوستافسن، ایلیا دوی، هالگریمور سموندسن، واسیل کادیفلی، آنیرودا باناهاتی، مکس کاشپارو، برنارد شوایگر، بیروته روزنفلد، لی تی تین تو، ماریانا گنچوا، ماریا جرکوویچ، جوسیپ پلیدین، میهای تریفوی، رودالف فیشر، پیتر زیلوار، اولریچ ماتیاس، اومبرتو بروکاتلی، هازل گرین، بیرگیتا آنیویک، جنین دومولین، آن کارین بوندوس، سوفیا کرودی ... من از صمیم قلب از آن‌ها سپاسگزارم.

مجله اسپرانتو: آیا کتاب همچنین به همراه نوعی مواد متدیک می‌باشد؟

اس.ام: بله: تصاویر آموزشی برای تدریس از طریق متد مستقیم (برای معلمان، ۵۰۰ کاغذ مقوایی A5 در دو صندوقچه، که قدم به قدم از کتاب پیروی می‌کنند – همچنین بر روی سی دی، برای نمایش عکس‌ها)؛ سی دی تلفظ مدل به فرمت mp3 – متون اسپرانتو خوانده شده + کتاب به زبان های مختلف به فرمت pdf، برای استفاده در کامپیوتر؛ Pekseso Esperanto (۱۲ جلد به همراه ۲۸۸ عکس از کتاب)، دوره مکالمه سمعی بصری اسپرانتو، سی‌دی داستان‌های آندرسون و ... برادران گریم؛ جدول معماها؛ برنامه برای موبایل (www.iei.nl.apo.htm).

برای اطلاعات بیشتر نام "Stano Marĉek" را در آدرس زیر جست‌وجو کنید (۱۳۱ عنوان).

http://katalogo.uea.org

منبع: مجله اسپرانتو دسامبر ۲۰۱۷
مترجم: علی مرادی


آیا علم تنها منبع اطلاعات موثق است؟

* وندل پونتس (برزیل)

بدون شک به لطف روش علمی بشر پیشرفت بزرگی را در درک مکانیسم‌های طبیعت تجربه کرده است. بدون آن، هیچ تکنولوژی ابتدایی در دسترس نبود. در رابطه با سلامت و کیفیت زندگی، کلمات از بیان این‌که چطور توسط علم ما داروها و درمان‌های موثری را کشف کرده‌ایم که، زندگی و کیفیت زندگی ما را بهبود می بخشند، قاصر است. همچنین نمی‌توان با کلمات بیان کرد که چطور موفق به افزایش تولید غذا برای تغذیه میلیاردها انسان در سراسر دنیا شده‌ایم. با وجود مشکلات دائمی تمدن ما، چشم‌پوشی از اهمیت علم برای گونه انسان ساده‌لوحی و اشتباه است.

به این دلیل، روش علمی بسیار معتبر شده است. خصوصا وقتی با ادعاهای غیربدیهی، یا شواهد محکم درباره فرضیه‌ها یا نظریه‌هایی که هم‌چنان کاملا متقاعدکننده نیستند، روبرو هستیم. اگرچه، با وجود همه این چیزها ما هم‌چنان با مقاومت در برابر ادعاهایی که از طریق علم به اثبات رسیده‌اند، برخورد می‌کنیم.

اگر به‌خوبی روش علمی را درک کنید، می‌دانید که آن عاقلانه می‌باشد. این روش توسط تجربیات و همچنین الگوهای امروزی تکامل یافته است، که به‌صورت کلی با نظر اکثر افراد متخصص در حوزه‌های تخصصی‌شان تطابق دارد. اما این روش در حقیقت مکانیسم انسانی برای کشف چگونگی عملکرد قوانین طبیعت – و استفاده از آن برای رفاه و رضایت خودمان می‌باشد. مانند علم، مسلما مکانیسم‌های دیگری نیز وجود دارند، که توسط آنها درباره دنیا اکتشاف می‌کنیم، و آنهایی که بدون شک علمی نیستند، لذا اشتباه نیز محسوب نمی‌شوند.



علم متدیک و بلندمدت است. اگرچه برای برخی بُعدهای زندگی‌مان، نمی‌توانیم آن‌قدر منتظر بمانیم تا برای همه‌چیز شواهد کافی داشته باشیم. اگر کسی درباره خطرناک بودن مکانی، پس از ساعتی مشخص، که من قصد رفتن به آنجا را دارم، اطلاع بدهد، بدون شک طی دهه‌ها در جست و جوی آمار نمی‌نشینم تا به این نتیجه برسم که آن مکان واقعا خطرناک است. این تصمیم کاملا علمی نیست، و بدون شک، احتمال این‌که بر پایه اعتماد به منبع، حقیقت داشته باشد، زیاد است.

هم‌چنین وقتی کسی به ما شیرینی تعارف می‌کند چنین اتفاقی می‌افتد. مزه‌کردن و دوست داشتن به روش علمی بستگی ندارد، و مطلقا این باعث نمی‌شود که آن چیز خوشمزه را به بقیه تعارف نکنیم. شما بر روی آن آزمایشی نکرده‌اید، با این حال اطلاعات شما به این دلیل که می‌خواهید دیگران از همان احساس خوش‌آیند و خوب با خوردن شیرینی مشخصی لذت ببرند، نامعتبر و مشکوک نیست.

مانند این مثال، در بسیاری از مواقع تصمیمات ما بسته به روش علمی نمی‌باشد، و این دلیل نمی‌شود که آن‌ها اشتباه باشند. تجربه شخصی، مانند علم، یکی از روش‌های مختلف برای شناخت درباره هر چیزی است. ما با منابع علمی مختلفی زندگی می‌کنیم، و آن‌ها هستند که ما را شکل می‌دهند.

* وندل تی. پونتس، پروفسور جانورشناسی در دانشگاه فدرال پرنامبوکا، برزیل. نماینده حوزه جانورشناسی، حشره شناسی و روش علمی انجمن جهانی اسپرانتو. نائب رئیس ISAE.

مترجم: علی مرادی
منبع: مجله Tra la mondo


Scienco

Ĉu scienco estas la nura fidinda informofonto?

Wendel Pontes (Brazilo)*

Evidente danke al la scienca metodo la homaro spertis nekontesteblan disvolviĝon pri la kompreno de la mekanismoj de la naturo. Sen ĝi, neniu fundamenta teknologio estus disponebla. Pri sano kaj vivkvalito, ne estas sufiĉe da vortoj por esprimi, kiel per scienco ni malkovris novajn efikajn medikamentojn kaj terapiojn, kiuj plilongigas nian vivon kaj plibonigas nian vivkvaliton. Nek precize esprimi kiel ni sukcesis altigi nian manĝaĵan produktadon por nutri miliardon da homoj en la mondo. Malgraŭ la konstantaj problemoj de nia civilizacio, ignori la gravecon de scienco por homa specio estas naive kaj volonte blindigi nin.

Pro tio, scienca metodo fariĝis ege fidinda. Ĉefe kiam oni pritraktas neevidentajn asertojn, aŭ donas al ni solidajn pruvojn pri hipotezoj aŭ teorioj ankoraŭ ne firme konvinkitaj. Tamen, malgraŭ ĉio ni ankoraŭ alfrontas rezistemon kontraŭ la per-science-pruvitaj asertoj.

Se vi bone komprenas la sciencan metodon, vi scias ke ĝi ne estas intuicia. Ĝi evoluis per eksperimentoj kaj ankaŭ per nuntempaj paradigmoj, ĝenerale akceptataj de la plejmulto el la profesiuloj en siaj respektivaj fakoj. Sed ĝi estas esence homa mekanismo por malkovri al si kiel funkcias la naturaj leĝoj – se vi permesas al mi uzi la esprimon – kaj uzi ilin por nia bonfarto kaj kontentigo. Samkiel scienco, kompreneble estas aliaj mekanismoj, per kiuj oni malkovras al si pri la mondo, kaj kiuj evidente ne estas sciencaj, kaj ne pro tio ili malpravas.

Scienco estas metodika kaj longdaŭra. Tamen por kelkaj aspektoj de nia vivo, ni ne povas doni al ni la komforton tiom longe atendi ĝis ekhavi sufiĉajn pruvojn por decidi pri ĉio. Se oni informas min pri la danĝereco de speciala placo kien mi intencas iri, ekde specifa horaro, mi certe ne traserĉos la statistikojn laŭlonge jardekoj por konkludi, ke ĝi estas vere danĝera. Tiu decido ne estas absolute scienca, kaj havas altan verŝajnecon esti vera – surbaze de la fidemo de la fonto, certe.

La samo okazas kiam oni proponas al ni specialan frandaĵon. Gustumi kaj ŝati ne dependas de scienca metodo, kaj nepre tio ne malhelpas ke ni ade propagandu la bongustaĵon al ĉiuj. Vi ne faris eksperimenton pri tio, tamen via informo ne estas malfidinda aŭ suspektinda nur ĉar vi volas, ke aliaj ĝuu la saman kontentigan senton per manĝado de la specifa frandaĵo.

